# EKO

**Esperiga Komuniko**

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado


## Enhavo


- Landa parado de Eŭropo
- Alvoko por pli da reagoj!
- Unuiĝintaj Nacioj – Fejsbuka aktiveco
- Interlingvistoj ricevas informojn
- Medicinistoj kongresis rete



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.



*EKO 2020-39 sendita el Budapeŝto, la 25an de julio*


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Detala superrigardo pri la landoj de Eŭropo

En majo komenciĝis la taskego aktualigi la informojn pri la Eŭropaj landoj en la serio <Landa Agado>. Tri monatojn poste, ĝia unua versio estas preta por diskonigo. Ĝis ricevis jam la estraro de UEA, la membroj de la Eŭropa Komisiono kaj per plusendoj la Landaj Asocioj de la Kontinento. La proporcioj de respondintoj estas iom modesta, kaj ni fidas, ke post pli vasta dissendado, venos pli da reagoj. Ni reeldonos la dokumenton post la alveno de pli da reagoj. Fine de ĉiu lando vi legas la staton de la informoj rilate al la jaro 2020. Mankas ĉi tie noti ĉiun lastan piednoton rilate al la kompilo, sed fontoj ekzistas. Ekde aŭgusto komenciĝos la giganta laboro pri ĝisdatigo de <Landa Parad’> por la aliaj kontinentoj. En la jaro 2021 la nemovadaj ciferoj estos ĝisdatigitaj. Jen la daŭrigo kaj ampleksigo de la siatempa Jarlibro, almenaŭ rilate al la ege grava Landa Agado. Trovu la plejlastan version de la Eŭropa <Landa Parad’> alkroĉe. Se ne reagis via landa asocio, bv. sproni ilin!

# Unuiĝintaj Nacioj: nova eldonaĵo en Esperanto

La Nov-Jorka grupo pri la rilatado de UEA kun Unuiĝintaj Asocioj prezentis sian plejlastan komunikon (numero 47). Tio haveblas en Esperanto, la franca kaj la angla. Ni alkroĉas la version en Esperanto.

Ĝi informas pri la paĝo Facebook **UN75 en Esperanto**, lanĉita kunlige kun la enketo de UN pri la opinioj de la publiko pri la estonteco de UN, jam havas membrojn en 54 landoj, nome: Alĝerio, Argentino, Bangladeŝo, Barato, Belgio, Benino, Bolivio, Brazilo, Britio, Bulgario, Butano, Ĉeĥio, Ĉilio, Etiopio, Fiĝio, Finnlando, Francio, Germanio, Grekio, Gvatemalo, Hispanio, Hungario, Irako, Irlando, Israelo, Italio, Kamboĝo, Kanado, Kolombio, Kongo D.R., Kostariko, Kubo, Laoso, Liberio, Litovio, Malajzio, Maroko, Moldavio, Nepalo, Niĝerio, Norvegio, Nov-Zelando, Pakistano, Palestino, Peruo, Pollando, Rusio, Serbio, Svedio, Tunizio, Turkio, Turkmenio, Ugando, Usono.

Plie ĝi informas pri prestiĝa nova eldonaĵo: trilingva libro (angla, franca, portugala) pri la tuta historio de la organizo, eldonita de Unesko en Brazilo en 2015. Tion prizorgis la dua vic-prezidento de UEA, Trezoro Huang Yingbao.

# Interlingvistoj ricevis freŝajn informojn – ankaŭ vi!

La novaj eldonoj de IpI (Informilo por Interlingvistoj, 112) kaj IfI (ĝia anglalingva eldono: Information for Interlinguists) haveblas rete:

IpI (Esperante):

Trovu la novan numeron kaj pli fruajn numerojn ĉe: http://www.esperantic.org/eo/publikajoj/ipi/

## Internacia Junulara Kongreso – nia estonto

La IJK en 2020 ne fizike okazis en Nederlando, kaj anstataŭe okazis en en multaj landoj per la interreto, ĝi estas granda junulara evento organizita de la Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) kaj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun E@I en Slovakio. Ĝi okazis de la 10-a de julio ĝis la 18-a de julio kadre de MondaFest' 2020.

Dum la plej populara programero ĉeestis 196 partoprenantoj samtempe la kongreson.
La programo variis de la mateno *ĝis la noktofin',* pro la tempozonoj estas logike ke ne ĉiuj spektas en la sama tempero. Ĵus publikiĝis resuma filmeto de la IJK:

https://www.youtube.com/watch?v=fdBX73SR4Tk&feature=youtu.be

## Ankaŭ Medicinistoj virtuale kongresis

La esperanta (sed nun dulingva, angla kaj esperanta) 21-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso (mallonge: IMEK) venis al fino en Hungario. Ĝi okazis inter la 17-a kaj 18-a de julio. Konsiderante la epidemiologian situacion, la evento estis organizita interrete ĉi-jare, helpe de ZOOM, sed kelkaj polaj partoprenantoj persone ĉeestis kun hungaraj.La Universala Medicina Asocio (mallonge: UMEA) estis fondita en 1908 kaj kunvenigas kuracistojn, apotekistojn kaj aliajn sanigajn profesiulojn. IMEK kongresoj ekokazis baze de hungara iniciato ekde 1977. La 21-a IMEK havis ret-partoprenantojn el 9 landoj. La 21 sciencaj prelegoj kovris ĉefe la temon de la epidemio de COVID-19. Okazis ankaŭ signifaj prezentoj pri aliaj temoj.

============== vortoj: 590 ===========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.